

ESTRARO  
de  
« ESPÉRANTO-GIRONDE »

\*\*\*\*\*

Centre Culturel Château Palmer  
33150 CENON  
Banque Postale :  
347771 F Bordeaux



\*\*\*\*\*

Prezidanto : Joël LAJUS  
1 Les Places  
33910 SABLONS DE GUITRES  
Tel : 05 57 69 26 96  
Mail : lajus.joel@wanadoo.fr

Sekretario : vaka posteno

Kasistino : Monique DUSSENTY  
76 avenue La Fontaine  
33560 CARBON BLANC  
Tel : 05 56 06 74 49  
Mail : monique.duss@free.fr



CAMPAGNE ORGANISÉE PAR ESPÉRANTO-FRANCE ET SAT-AMIKARO

# l'espéranto au bac!

WWW. ESPERANTO-AU-BAC.FR

Je reçois comme un honneur la proposition que me font les deux associations Espéranto-France et SAT-Amikaro de parrainer cette pétition en faveur de l'espéranto. Je souhaite que l'enseignement de l'espéranto soit officialisé par les autorités de nombreux pays. Un jour viendra où tout être humain saura utiliser l'espéranto comme un instrument de mise en commun.

Albert Jacquard

**1 L'espéranto offre une ouverture sur l'ensemble de la planète**  
Les langues actuellement éligibles comme option au bac n'ouvrent que sur un nombre restreint de pays. Les lycéens qui choisissent l'espéranto auront rapidement accès à tous les pays du monde où l'espéranto est pratiqué (une centaine à ce jour). Ainsi l'espéranto constitue une porte ouverte vers toutes les cultures. Le Pasporta Servo, service d'hébergement chez l'habitant, permet déjà aux espérantophones de découvrir la réalité d'un pays en dehors des sentiers touristiques.

**2 L'espéranto est une langue facile à apprendre**  
La simplicité de l'espéranto met les élèves en situation de succès. Tout d'abord, l'espéranto est une langue ludique : les règles de conjugaison et de construction des mots permettent rapidement de faire des phrases et d'avoir des échanges. En permettant de passer à la pratique plus vite, l'espéranto donne une autre vision de l'apprentissage des langues. Enfin, les principes de construction des mots permettent d'économiser la mémoire (voir encadré).

**3 L'espéranto est une langue pour tous**  
Beaucoup plus simple à apprendre donc plus vite enseigné, l'espéranto peut être appris partout et par tous : dans les pays pauvres où les budgets manquent ; par les élèves ne faisant pas de longues études.

Plus de 120 ans après sa création, la langue espéranto, portée par un réseau d'associations, est parlée dans une centaine de pays répartis sur les cinq continents. Cette langue de communication internationale dispose de nombreux atouts.

Aujourd'hui, les associations faisant sa promotion en France s'unissent pour demander une reconnaissance officielle dans le système éducatif par son introduction dans la liste des options possibles au baccalauréat.

Voici pourquoi en onze points.

## MIA IREMA KONGRESO EN SETE



En la stacidomo *Bordeaux Saint-Jean* mi renkontis Isabelan, venantan de *Angoulême*. Irante al *Sète* por partopreni al la Esperanto Renkonto IREM, ni devis vojaĝi en la sama trajno. Ĉu vi kredas tion? Tute hazarde nia vagono estis la sama, kaj ankoraŭ pli hazarde, niaj sidlokoj estis ... unu apud la alia! Bona aŭguro! Mi do ne malfermis la

libron kiun mi kunportis por akompani min kaj tutamike ni interbabilis, en esperanto kompreneble, dum preskaŭ la tuta vojaĝo. Alveninte malfrue en la vespero ni estis varme akceptitaj en la stacidomo de *Sète* kaj veturile kondukita en la kongresejon situantan en la fericentro *Le Lazaret*, kie atendis nin bonvena pikniko.

Malgraŭ la malvarmeta vetero dum la unuaj tagoj (mi bedaŭris ke mi ne kunportis kelkajn lanaĵojn), la pli ol 367 partoprenantoj varmigis la etoson kaj kontribuis je plensukceso de tiu renkonto. Riĉega programo, vere, tiel rigardante la prelegojn kiel la distrajn vesperojn kaj la ekskursojn de kongresfino. Kompreneble estis tiom da samtempaj okazaĵoj ke mi devis elekti, krom la oficialaj kunvenoj :

- per Esperanto por helpo al migruloj, far *Guy Martin*, kun la kortuŝa interveno de *Josefo el Kongolando*;
- historio de Langvedoko far *Arno Lagrange*;
- Seta vivo far *Alain Camélio*, kiu parolis nur en la okcitana lingvo tradukita de Jomo;
- Jules Verne kaj Esperanto far *Abel Montagut*.

Fakte, mi preterlasis plurajn erojn pri kiuj mi interesiĝus :

- bildoteatro far *Sanpei Keiko*;
- ĉu Esperanto estas facila lingvo far *Pjer Buyje*;
- ĉu vi konas Nepalon far *Narendra Raj Bhattarai*.

- k.t.p. ...
- 



Angulo por la legantoj

Tre kortuŝis min la bildkarto sendita de la Kongreso en Sète. Mi kore dankas la geamikojn kiuj subskribis ĝin. Mi tre bedaŭras ke mi ne plu povas partopreni esperantajn renkontojn sed la tempo pasas kaj tiel iras la vivo! Fruktononan esperantan laboron mi deziras al vi ĉiuj. Kun agrabla somerlibertempo Plej amike

*Ŝeline.*



*Espéranto en Pays Foyen tutkore kondolencas Thierry kaj Marie-Hélène okaze de la malapero de la patro de Thierry en majo 2011.*

*Sabine*

## AMERIKO INSURGENTA

(Poemo de Pablo Neruda, muziko de Mikis Theodorakis,  
traduko de Georges Lagrange)

*Nia tero, vasta tero, la solejoj, nia tero  
Laŭtis do de rumoroj, brakoj, buŝoj*

*Tiam silenta silabo ardentigis  
Kunigante la rozon enkaŝitan  
Tiel ke brutremadis la herbejoj  
Kovritaj de metaloj kaj galopoj.*

*'stis dura la verec' kiel plugilo.*

*Rompis la teron, starigis ĝi la deziron  
Ĝi plantis siajn semojn propagandajn  
Kaj naskiĝis en sekreto la printempo.  
'stis silenta la flor, 'stis forpuŝata  
Ĝia faskaro de lum',*

*'stis batalite kontraŭ la gisto kolektiva,  
La kiso al la standardoj forkaŝitaj  
Sed ŝprucis rerompante ĉiujn murojn,  
Elŝirante karcerojn el la grundo.*

La lastan fojon, dimanĉon la 19an de junio 2011, en la preĝejo  
« Notre Dame de la Croix de Menilmontant » en Parizo, antaŭ grandega pu-  
bliko, la esperanta koruso INTERKANT koncertis la KANTON  
ĜENERALAn.

La ses antaŭaj koncertoj konis la saman sukceson:

- Bouresse, julio 2009
- Hillion, aprilo 2010
- Kaiserslautern, majo 2010
- Le Mans, junio 2010
- Cuba, julio 2010
- Toulouse, marto 2011

Sed la aventuro daŭrigos, sub alia formo...

*Monique*

Plie ni, pluraj kantistoj, dufoje retroviĝis, ĉe *Franjo* por provkanti  
kelkajn kantojn.

Tamen mi ne bedaŭras miajn elektojn.

La du grandaj libroservoj allogis multajn personojn, inter alie pro  
la peticio pri « *l'Espéranto au bac* » (Esperanto en bakalaŭrezkzameno).

Male mi ĝuis la tutajn distrajn vesperojn: kantistoj, teatraĵo-  
roj, muzikistoj, ĉiuj talentplenaj. Mi ankaŭ spektis la filmon  
« Esperanto » de Dominique Gautier en la seta kinejo. Laŭ mi, ŝajnas ke  
estis pluraj intervjuoj similaj. Pro tio mi ŝatus denove spekti ĝin, por havi  
pli ĝustan opinion, sed la lasta projekcio en la centro estis nuligita.

Mardon, mi eniris la aŭtobuson en direkto al la Suda Kanalo kaj ties  
belega historio. Mi miris antaŭ la naŭ kluzoj en *Fonserannes*, la kanal-  
ponto, la kanal-tunelo kaj, finfine, la grandega vidaĵo de la opidumo en  
Ensérune.

Ĉar mi plilongigis mian restadon, por bele fini ĝin, merkredon mi  
profitis de la vaportrajno de Ceveno en *Anduze* ĝis *Saint Jean du Gard*,  
de la belega bambua arbaro en *Génégarques*, de la malgranda sed riĉega  
muzeo de la cevenaj valeoj.

Ĉiuj vizitoj etis ege interesaj, sed, bedaŭrinde, tempo mankis por  
plene aprezi tiom da malkovroj. Kiel diris nia gvidisto, tio estas nur ekvi-  
daĵo por doni al vi emon reveni en nia regiono!

Jaŭdon posttagmeze, restis nur apenaŭ dek kongresanoj. Estis tem-  
po por reveni hejmen.

Dum tiu semajno mi revidis kun plezuro malnovajn amikojn aŭ ko-  
natulojn, kaj malkovris novajn.

Aprilo 2011

*Monique*






**Jacques Yvart kaj Famo koncertis en Cambes**  
**Kunligo de Brassens kaj Esperanto por bela publika sukceso.**

Sub impulso de Esperanto-Gironde la urbeŝtaro de Cambes invitis Jacques Yvart kaj Famo-n koncerti en la vilaĝa festosalono sabaton la 16an de aprilo. Esperanto-Gironde kunlabore zorgis pri la organizado: kontaktoj, kontraktoj, akceptado (kaj regalado -*dankon Claudine-*) de la artistoj kaj de la son- kaj lum-teknikistoj, preparado kaj eldono de 150 afiŝoj (A3-formato) kaj 600 afiŝetoj (A5-), redaktado de presdosiero kaj fine eĉ propono de kuntrinkaĵoj por agrabla postkoncerta babilado. Informcele la urbodomo instaligis du grandajn banderolojn ĉe strategiaj vojkruciĝoj jam tri semajnojn antaŭ la koncerto, disdonigis la afiŝetojn en ĉiujn leterkestojn de la vilaĝo kaj la vic-urbeŝtrino respondis intervjuon ĉe Radio-France Bordeaux-Gironde. Certe la nomo Brassens allogis pli ol Yvart. Tamen tiuj nomoj aperis ligitaj same kiel tiu de Esperanto-Gironde kiel kunorganizanto de la urbodomo.

Kaj cent dek personoj telefonis al la urbodomo por rezervi sidlokojn. Kutime inter 60 kaj 70 personoj tion faras. La urbeŝtaro do tre favore jam miris vendredon kaj do instaligis kromajn seĝojn. Kaj sabaton vespere la artistojn aplaudis pli ol cent kvindek spektantoj. Inter ili, pluraj membroj el nia asocio, kaj mi tre ĝojis revidi geamikojn, kiujn mi delonge ne plu vidis kiel Glorian kaj Famon ekzemple, kaj ekkoni novan esperantistinon el Gujan, Christine.

Sursceneje Famo komence surprizis la neavertitan publikon dank'al tri personaj kreaĵoj. Kaj Jacques disvolvis sian Brasensan repertuaron, prezentante tre famajn kanzonojn sed ankaŭ malkaŝis kelkajn nekonatajn originalaĵojn de la seta poeto. Kunkantante ĉiuj estis ravitaj kaj neniu deziris, ke jam finiĝu la muziko. Ĉiuj esperis tiun titolon aŭ tiun ĉi, kiel *Brave Margot* aŭ *La mauvaise réputation* aŭ... La profesia nivelo en la muzik- kaj kantarto estis reliefigitaj de aparta sindonemo de la artistoj. La kamba publiko frande rikoltis la fruktojn de ilia individua laboro kaj komuna komplikeco malavare dispartigitaj.



Multege da stenografiaj esperantistaj metodoj naskiĝis je la komenco de la 20a jarcento.

Pri la unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer, en 1905, ekzistas raporto pri la oficialaj paroladoj, diskutoj kaj decidoj, per la svisa stenografia metodo de Friedrich Schwenberger.

En 1914 aperis la unua eldono de la franca metodo Duployé-Flageul, en la kolekto de Fluganta Skribilo.

En 1929, aperis malgranda libreto, en tiu metodo, pri kelkaj poezioj de L.L.Zamenhof: “La Espero, La Vojo, Al la Fratoj, Preĝo sub la Verda Standardo, Mia Penso, Ho mia Kor’, En Songô”.

Monique



## MAJA KUNVENO EN LIBOURNE

Ni estis sufiĉe multnombraj (Micheline, Jean-Seb, Jean-Claude kaj Jean-Luc estis senkulpigitaj pro ne-ĉeesto). Ni unue aŭskultis Janine kaj Yannick, kaj ankaŭ Bernard kiuj raportis, helpe de fotoj, pri la universala kongreso en Kubo (dankon al ili). Tiukaze, ni unuafoje uzis nian propran videoprojekciilon.

Poste Marcelo (dankon al li) montris al ni fotojn pri la interasocia kongreso de Sète kie naskiĝis grava novaĵo por ni. La ĉeestantaj ĝirondanoj aŭdis, ke en 2013 okazos en Artigues interasocia kongreso denove, sed ĉifoje organizota de la Fervojistoj (internaciaj) kune kun Esperanto-France. La respondeculoj kalkulas kun ĝironda helpo ĉar ili scias pri la ĝironda sperto!

Kelkaj el ni, Marcelo, Monique, Bernard, Rose kaj mi, pretas helpi kaj tiucele renkontis, en Junio, kelkajn organizontojn. Ni parolos pri tiu evento okaze de nia septembra ĝenerala asembleo, kiu okazos...



## NIA ĜENERALA KUNSIDO OKAZOS

**LA 24an de SEPTEMBRO , EN MARGUERON ,**

**ĈE NIA AMIKINO SABINE , EN LA BILLETTE**

**venu multnombraj!**

**Je la 10 h 30 kun via pikniko.**

Honoron mi persone (duon-surprize) ricevis, kiam preskaŭ fine Jacques kantis en esperanto mian tradukon *Povra Marteno*. Amuzas min lia antaŭprezento de tiu teksto aludante pri iu fantazia (ĉar ne ekzistinta) onklo de Oĉjo Georges. Tiu onklo estis esperantista poeto. Li postlasis kajeron, sur kiu la juna Brassens legis la versojn: *Povra Marteno, povra mizero, fosu en tero, fosu en temp'*.

La urbestro antaŭtimis, ke post la lasta aplaŭdo la publiko rapide forvaporigis kaj tial hezitis pri la invito al kuntrinkado. Malbona sama afero jam spertiĝis. Tamen centoj da personoj tintigis glasojn da bongustaj lokaj vino kaj vinbersuko. Multaj profitis la okazon por raportoj pri siaj ŝato aŭ eĉ amo al Brassens kaj ties repertuaro, aĉetis diskojn, kelkaj petis informojn pri Esperanto, prenis informilon. Kaj pli ol unu horon poste mi devis interrompi diskutojn, forŝirante la artistojn el amikaj rondoj.

La urbestro, kiu jam dekomence subtenis la projekton, persone ĉeestis. Li rajtas fieri pro sia politiko favora al kulturo, kiun li deziras altkavalitan kaj tre varian. Ĉiusezone li organiz(ig)as eventon, ĉiam senpaga, tial ke li volas, ke kulturo estu alirebla al ĉiu, eĉ nemonhava.

Post la koncerto, la ideo ekĝermis, ke iam Famo povos reveni por prezenti propran repertuaron. Kiel la nomo Yvart, la nomo Famo verŝajne ne sufiĉos por venigi cent kvindek spektantojn, tial nepre necesos trovi kombinon, sed kial ne?

La morgaŭon Jacques kaj Fabrice reludis la saman repertuaron. Sed kantante ne plu franc-lingve sed en esperanto. Efektive tiun saman spektaklon ili prezentos en Seto en la internacia lingvo. Kaj tie oficiale aperos la registrita kompakt-disko, kiu kompilas la kanzonojn de la spektaklo. Ni reparolos pri tio...

*La 19an de aprilo 2011*

*Marcelo*

**Du parizaj samideanoj, Johano kaj Renato, renkontiĝas en subtera trajno.  
Johano legas esperanto-gazeton.**

R - Saluton Johano, ĉu vi legas neordinarajn novaĵojn en via gazeto?

J - Jes, vere!.. Mi ĵus legis ke, en Ĝirondio, la loka esperantistaro imagis esperanto-feston por reklami favore al la internacia lingvo.

R - Kion ili faris?

J - Ili proponis ludojn por infanoj kaj ankaŭ por adultoj.

R - Kiujn ludojn?

J - Temis pri 5 ludoj:

- \*\* **La elektra infanveturilo:** oni devis sekvi senerare specialan itineron.
- \*\* **La argilo:** oni devis skribi la vorton ESPERANTO per argilo.
- \*\* **La frazo-ludo:** ĉiu infano skribis simplan frazon, france kaj esperante; kaj ornamis la tutan paperfolion per desegno.
- \*\* **La saĝetoj:** la celo estis paŝglui saĝetojn sur vertikala mondomapo.
- \*\* **La esperanto-ekzerco:** simpla traduko pri kelkaj gramatikaj punktoj.

R - Ĉu la afero sukcesis?

J - Ŝajnas ke jes; kaj la etoso estis tre simpatia.

R - Ĉu la partoprenantoj gajnis ion?

J - En ĉiu ludo, krom la frazo-ludo, ili gajnis poentojn; kaj je la fino, ili faris la sumon.

R - Sed, ĉu ili ricevis rekompencojn?

J - Jes; la gajnanto ricevis gravan donacon; sed ankaŭ la aliaj ricevis ion.

R - Ĉu ili estis multnombraj?

J - Jes, sufiĉe; deko da familioj, kun infanoj, venis.

R - Kiamaniere finiĝis la festo?

J - Per agrabla manĝeto en la plurfaka salono de la urbeto.

R - Ĉu tio okazis en Bordo?

J - Tute ne; meze de kamparo, en malgranda urbeto kies nomo estas Galgono.

R - Gratulojn al niaj galgonaj samideanoj!

*Diskrete registris Joël*



## KAPRIOL EN GALGONO

La frizlanda trupo alvenis en Galgono, la 19an de Aprilo, vespere.

Ni akceptis ilin sur la publika placo fronte al la urbo-domo. Ni kune trinkis, interkonatiĝis, babilis... kaj fotis! Poste ni kune vespermanĝis en la plurcela salono. La etoso estis tre agrabla kaj tre gaja; fine, ni kune kantis.

La morgaŭan tagon, ni tagmanĝis en liburna memserva restoracio kaj poste, dum la tuta posttagmezo, ni preparis la koncerton, en la urba festsalono.

Pli ol kvindek personoj alvenis vespere por aŭskulti la kanzonojn kaj ankaŭ por danci la tradiciajn dancojn en simpla familia etoso. Ŝajnas ke ĉiuj ŝatis tiun artan vesperon kun la grupo Kapriol; tre bona (ĉu efika?) propagando por Esperanto!

*Joël*